# HELIKO

GAZETO DE LA KOMUNUMA ESPERANTO ORGANIZAĴO RIJEKA

LA 5-a JARO - NUMERO 15 - DECEMBRO, 1986.



Gazeto de la Komunuma Esperanta – organizaĵo – Rijeka
List OK Saveza za esperanto – Rijeka

**Redaktoro:** Damir Rak
**Urednik:**

**Lektoro:** Anja Hurčak
**Lektor:**

**Adresa de la redakcio:** Esperantista societo
"A. Š. Turkovič"
Korzo narodne revolucije 2a/III
51000 R I J E K A

**Telefono:** (051) 34-670

**Presita en:** Vera Hofbauer, Rijeka
**Štampano u:**

**SOLENA NUMERO**

**Skribis:** Rado Škalamera

**Titolpaĝo:** Aleksandar Šandor Turkovič
**Naslovna stranica:** designis de Vanja Mušnjak

**40** JAROJ GODINA

**1946 — 1986**

ESPERANTO SOCIETO
„A. Š. TURKOVIĆ"
DRUŠTVO ESPERANTISTA
RIJEKA



skribis R. Škalamera

La okan de Januaro 1986. plenigis 4o jaroj de la Esperantista societo en Rijeka sub la nomo "Aleksandar Š.Turković", t.e. sub la nomo de elstara esperantisto, pafmortigita de ustaŝoj en Aŭgusto 1941. Antaŭ 4o jaroj tiu ĉi societo estis, nur sep monatoj post la liberiĝo de nia lando, "inter la unue refonditaj societoj", aŭ, pli precize, la tria refondita societo esperantista en Kroatio post la dua mondmilito. KEL estis fondita la 9-an de Septembro 1945, kaj JEF (Jugoslavia Esperanto-Federacio) nur la 14-an de Aprilo 1946., do tri monatojn pli poste ol la societo en Rijeka.


Telegrafe mallonge oni nur rememoru ke la organizita poresperanta agado en Rijeka komencis jam de la 28-an de Septembro 19o7. sub la nomoj Adriatika ligo kaj Fiumana Esperantista Grupo. El tiuj tempoj, ekzemple, datumas la esperantiĝo de Josip Šikić, eminenta nia membro, ekde la 13-a de Februaro 1955. dumviva honora prezidanto de nia societo. Post la unua mondmilito, la 2o-an de Aŭgusto 1922. estis fondita Esperantista societo Sušak. Ĝia tiama kasisto estis Marijan Levar, kaj Marijan Levar estis unu el la refondintoj de nia societo antaŭ 4o jaroj! Nia forpasinta societano dro Miho Monić jam en la jaro 1924, dum la II sudslava Esperanto-kongreso en Split, proponis fondiĝon de "Esperanta instituto kaj

Konsulta ekzamena komisiono por Esperanto-instruistoj por l reĝlando SHS", kaj la Kongreso akceptis la proponon. Suŝkano profesoro pri filozofio Ivan Večerina jam en la jaro 1929. gvidi en Belgrado Esperantan kurson en Studenta Esperantista Klubo ĉe Beograda Universitato. La 15-an de Septembro 1935. en Sušak estis fondita la filio de LES. La fondiĝkunvenon partoprenis 35 kamaradoj. Prelegis Vinko Skomina, tiu Skomina kiu poste kune kun Levar estis iniciatinto por refondi nian societon sub la hodiaŭa nomo. La unuan kurson en la jaro 1935. gvidis kamarado Rudolf Medved. Ankaŭ hodiaŭ li estas nia societano. La lasta nomo de esperantista societo en Sušak antaŭ la dua mondmilito estis "Adriatika stelo". Sub tiu nomo ĝi agadis ekde 21-a de Novembro 1937. (En tiu jaro, ĝuste la 7-an de Novembro 1937, kiam dro Maruzzi prelegis en suŝaka kinejo "Jadran" pri Esperanto, esperantiĝis ankaŭ la aŭtoro de ĉi tiu artikolo.)

La societa arkivo konservas la originalan protokolon pri la fondiĝkunveno antaŭ 4o jaroj. La konstituanta kunveno okazis en la "Gradska pučka škola" en Sušak (en la ejoj de la hodiaŭa Fakultato de konstruadsciencoj) je la sesa horo (18 h) la 6-an de Januaro 1946. La Iniciativa komitato konsistis el tri membroj: Vinko Skomina, Marijan Levar kaj Ivka Gropuzzo.

Vinko Skomina kaj Marijanon Levar mi jam menciis. Kiu estas la tria? Kiu estas Ivka Gropuzzo? Ŝi estis la edzino de dro Ante Gropuzzo, kaj ili du gepatroj de Ivo, Nada kaj Maša.Aldonu nun ĉi-momente nur tion ke la tuta kvinmembra familio estis esperantista. Nada Gropuzzo troviĝis en la jaro 194o. inter la unuaj diplomitoj post farita ekzameno pri Esperanto-instrukapablo en Zagreb. Dro Ante Gropuzzo, juĝisto, estis dum pluraj jaroj la prezidanto de la societo kaj ekde la 24-a de Februaro 1971. ĝia dumviva honora prezidanto.

Al la fondiĝkunveno partoprenis ĉi tiuj 35 personoj: Ivka Gropuzzo, dr Ante Gropuzzo, Maša Gropuzzo, Cila Baborić Ruka-



Gradskom N.O.

Sušak IV

Esperantisti – članovi Saveza Esperantista Hrvatske – prijavljuju da će 8.I.1946 u 6h u Gradskoj pučkoj školi, održati sastanak u svrhu biranja odbora za podružnicu Saveza u Sušaku, prema Statutu koji se prilaže.

Za inicijativni odbor:

Slemina Viktor

Lenac Marijan

Gašparac Luka

GRADSKI N. O. - SUŠAK
Upravni odjel
Broj 355 dne 8/I 1946 IV

Dozvola izdana

[signature]

355/3

Sušak, 8.I.1946.

Društvo Esperantista „S. Tuković" u Sušaku, osnovano 8. I. 1946. Konstituirajućoj skupštini prisustvovalo je 35 članova:

| | | |
|---|---|---|
| Gropuzzo Jolka, | Cetina Vojislav | Pandur Albina |
| Rundić Ivan, | Fulgosi Ante | " Andrija |
| Škalamera Željko | Bručić Vinko | Višić Vinko |
| Skomina Vinko | Bačić Anton | Pandur Petar |
| Franić Lina | Wessiak Neda | Sulemanović Vojislav |
| Plivelić Marija | " Ervin | Mugandija Nikola |
| Rukavina Cila | Tučinić Vladimir | Turina Srećko |
| Bakorić Roko | " Boška | Rubaš Tomislav |
| Lučić Rudolf | Zvonar Josip | Kovačević Miljenko |
| Pandur Vera | Accurti Štefanija | Božnjak Petar |
| Pandur Nužna | Gropuzzo Dr. Ante | Antonić Vinko |
| Zevar Marijan | " Maša | |

Upravni odbor:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Predsjednik: | Skomina Vinko, | zamjenik | Wessiak Ervin |
| Tajnik: | Škalamera Željko, | " | Gropuzzo Jolka. |
| Blagajnik: | Tučinić Boška, | " | Bručić Vinko |
| Knjižničari: | Gropuzzo Maša | " | Rundić Ivan |

Nadzorni odbor:

Zevar Marijan, Rukavina Bakorić Cila, Accurti Štefanija.

Časni sud:

Bakorić Roko, Plivelić Marija, Kovačević Miljenko.

Prva sjednica upravnog odbora održana je 13. I. 1946. u stanu obitelji Pandur, Grohovčeva 9 na kojoj je zaključeno, da se redovite sjednice održavaju 2 x mjesečno tj. svaku drugu nedjelju, a tečaj Esp. jezika počima 1. II. u istom stanu svake srijede od 19-21h. Štele će se pobrinuti za gramatike od Lavara.

vina, Roko Bahorić, Vera Pandur, Dušan Pandur, Albina Pandur, Andrija Pandur, Petar Pandur, Vinko Skomina, Marijan Levar, Josipa Levar, Željko Škalamera, Ivan Rundić, Nikola Dugandžija, Anton Bačić, Ante Falgosi, Srećko Turina, Miljenko Kovačević, Lina Vranić, Marija Plivelić, Rudolf Lukić, Vojislava Cetina, Vinko Briščik, Neda Wesiak, Ervin Wesiak, Vladimir Vučinić, Boška Vučinić, Štefanija Accurti, Vinko Višić, Vojislav Vukmanović, Zvonimir Bubaš, Petar Bošnjak i Vinko Antonić.

La unua plenumkomitato de la societo konsistis el tiuj ĉi anoj: Vinko Skomina, prezidanto, Željko Škalamera, sekretario, Boška Vučinić, kasistino, Maša Gropuzzo, bibliotekistino, plus Ervin Wesiak, Ivka Gropuzzo, Vinko Briščik, Ivan Rundić, Marijan Levar, Cila Bahorić, Štefanija Accurti, Roko Bahorić, Marija Plivelić kaj Miljenko Kovačević.

En la jam flaviĝitaj folioj de la unuaj mane skribitaj protokoloj de Vinko Skomina oni ĝuas la ĉarmon de la unuaj modestaj agadoj. La societo estis sen iuj ajn propraj ejoj. La unua kunsido de la societa plenumkomitato okazis la 13-an de Januaro 1946. en la loĝejo de la familio Pandur, en la strato Grohovčeva 9. Ĉi tie ni aldonu ke la familioj Gropuzzo, Pandur kaj Bahorić estis parencaro.

La kunsidoj okazadis dufoje ĉiumonate, ĉiun duan dimanĉon, kaj la kurso de Esperanto komenciĝis la 1-an de Februaro kaj okaziĝis en la menciita loĝejo ĉiumerkrede de la 19 ĝis la 21 h. La unua kursgvidanto estis dro Ante Gropuzzo. Ĉe la komenco estis 17 kursanoj. Fine de Majo la kurson sukcese finis 7 kursanoj. Post tri monatoj de la somera paŭzo, komencis nova kurso, ĉi-foje en la ejo de la gimnazio en Sušak. La kursgvidantino estis la instruistino Cila Bahorić-Rukavina, multjara UEA-delegito en Rijeka. La kursanoj estis komence 16 (gimnaziaj lernantoj, fervojistoj, tipografoj, oficistoj, dommastrinoj kaj unu juĝisto, nome

prezidanto de la tribunalo en Sušak) kaj poste 9. La kurso finiĝ.s fine de la jaro 1946.

En tiu unua jaro de la vivo de la societo "A. Š.Turkovi:" okazis tri amasaj kunvenoj en la ejoj de la gimnazio en Sušak.Al .a unua partoprenis, inter aliaj, profesoro Milivoj Mihajlović k.j Ivan Širola, du tre malnovaj esperantistoj (la unua el 1928. k.j la dua el 1938.).La instruistino Cila Bahorić prelegis helpe de lumbildoj pri esperantistaj internaciaj renkontiĝoj, pri Esperant.j libroj kaj gazetoj. Al la dua amasa kunveno partoprenis Nada Grop.- zzo, la sekretarino de la Kroatia Esperanto-Ligo, kaj ŝi parol.s pri la postmilita evoluo de la Esperanto movado en Jugoslavio k.j en la mondo. Dum la tria amasa kunveno Vinko Skomina prelegis pri .a historio de Esperanto-movado en Sušak. Ankoraŭ unu prelegon ten.s Skomina pri Esperanto en la kinejo de fervojistoj al 2oo fervojistoj.

Por bone kompreni la etoson regantan en la societo en tiu unua jaro de la vivo post la milito, menciindaj estas ankaŭ la faktoj ke oni tiam legadis la revuon "Internacia Kulturo", kaj ke la societanoj korespondadis kun esperantistoj el Bulgario, Ĉeĥoslo- vakio, Nederlando, Britio, Italio, Hungario, Egiptio...

Jam dum la monato Januaro 1947. en sia loĝejo, la instr.- istino Cila Bahorić instruis ĉiun lundon kelkajn progresintajn so- cietanojn. La 23-an de Februaro 1947. okaziĝis la unua reg.la jarkunveno en la gimnazio de Sušak kaj en Marto komenciĝis la t.ia elementa Esperanto-kurso sub la gvido de Cila Bahorić.

Jen tia estis la komenco antaŭ 4o jaroj.Ne sen zorgoj kaj malfacilaĵojn.

## La unuaj zorgoj kaj malfacilaĵoj

En la unuaj klopodoj kritike pritaksi kialojn de la mal- facilaĵojn en la agado de la societo oni mencias du fenomenoj: unue malgranda kaj nesufiĉa kunlaboro de malnovaj, antaŭmilitaj esperan- tistoj, kaj due, subita foriro de multaj kursanoj-komencantoj pro

ilia trookupiteco en alia laboro, aŭ en iliaj profesiaj devoj. Tiaj tempoj estis tiam: renovigo kaj rekonstruo de la lando multe devontigis ĉiujn civitanojn. Esperanto ne estis tiel grava, por ke ĝi estu en la unua vico de la tiamaj popolaj interesoj. Entuziasma fervoro post la gajno de libereco elĉerpiĝadis en unuarangaj laboroj de la socialisma rekonstruo de la lando kaj de la vivo.

En la kadro de tiaj tiamaj cirkostancoj al mi ŝajnas tre interesa la letero de la Esperantista societo "A. Š. Turković" al la Kroatia Esperanto-Ligo, datumita la 1-an de Februaro 1946. Ĝi tekstas jene:

"Prema uputama koje ste nam dali u dopisu radi prijave podružnice Gradskom N. O-u još do sada nismo postupili, jer želimo da vi ipak sa Vaše strane pošaljete jedan dopis ne samo na Gradski NO Sušaka, već i na druge strane, kako ne bi došlo do sličnih slučajeva, tj. da niža vlast ne poštiva naredjenja više vlasti. To je već samoga principa radi potrebno, pa sada očekujemo od Vas da nam najhitnije odgovorite na ovaj naš dopis. Moglo bi se i to dogoditi, da Gradski NO ne dozvoli osnivanje podružnice, jer je to prepušteno njegovoj volji, pa bi došli u nezgodan položaj."

Oni devas primemori ke Rijeka estis liberigita la 3-an de Majo 1945, sed laŭ la Beograda interkonsento de la 9-a Junio 1945. la landlimo sur la rivero Rječina restis
duoninsulo Istrio estis administritaj de la Jugoslavia armeo. Rijeka kaj Sušak oni traktis ankoraŭ kiel du urboj kun siaj apartaj Urbaj popolliberigitaj komitatoj ( Gradski narodnooslobodilački odbori). Nur post la 10-a de Februaro 1947, kiam en Parizo oni subskribis la packontrakton, Rijeka estis rekonita kiel konsista parto de Jugoslavio. La unua komuna Urba popol-liberigita komitato de unuiĝintaj Rijeka kaj Sušak je unu urbo okazis la 1-an de Januaro 1948.

Do, por la urbaj potenculoj Esperanto tiam ververe ne estis iu unuaranga afero. La esperantistoj estis lasitaj pli-

-malpli al ili mem. Kaj la organizo, la societo, estis nur libera asocio de liberaj civitanoj. Hodiaŭ estas tute male: Esperanto-organizaĵoj estas rekonitaj laŭ la leĝo kiel socie utilaj, do sociaj organizaj. La tempo pasis. Kiam ni hodiaŭ retrorigardas al tiuj unuaj klopodoj de suŝakaj esperantistoj, ni povus nur admiri iliajn entusiasmon, ilian persiston, ilian noblan idealismon, ilian altruisman agadon. Ili tiam kolektadis inter si "memvolan kontribuon por Esperanto-movado". Ekzemple, en Majo 1946. Šikić, Levar, Bahorić, Gropuzzo, Seršić, Frančić, Skomina, Pandur kolektis tiel el siaj poŝoj 7oo dinarojn...

## Ascendoj kaj faloj, elano kaj regreso

Ne estus saĝe deklari konkludojn pri la situacio de Esperanto en Rijeka nur laŭ la nombro de membroj de la societo, nur laŭ la nombro de tiuj kiuj regule pagas la membrokotizon. Do, ni estu prudentaj kaj ne facilanimaj en la konkludoj. Sed, tamen sinankaŭ tiuj donitaĵojn ion diras al ni. Oni povas esti tre singardemaj kaj ne ĝeneraligema, sed oni ne povas ne kompari la nombrojn. Post la komparado ĉu ni parolu pri normalaj ascendoj kaj refaloj, ĉu pri alterna elano kaj regreso, ĉu pri stagnanta aŭ retropaŝanta situacio, ĉu pri progreso aŭ pri dekadenco? Pritaksu vi mem.

Ĉe la fondiĝo de la filio de LES ( Laborista Esperanto societo) en la jaro 1935. en Sušak partoprenis 35 kamaradoj.Sušak tiam nombris ĉirkaŭ 16ooo enloĝantoj. Ĉe la fondiĝo de la Esperantista societo "A. Š. Turković" en la jaro 1946. en Sušak partoprenis ankaŭ 35 personoj. Rijeka kaj Sušak kune nombris tiam ĉirkaŭ 5o.ooo enloĝantoj.

Jen la listo de 46 membroj de la societo "A.Š.Turković" je la 1-a de Novembro 1947. :

Vinko Skomina, komercisto, Cila Bahorić, instruistino, dr Ante Gropuzzo, juĝisto, Ivka Gropuzzo, dommastrino Maša Gropu-

zzo, lernantino, Vera Pandur, dommastrino, Dušan Pandur, studento, Albina Pandur, dommastrino, Andrija Pandur, komercisto, Petar Pandur, lernanto, Marijan Levar, farbisto, Josipa Levar, dommastrino, Marija Plivelić, dommastrino, Vojislava Cetina, laboristino, Vinko Višić, muzikisto, Mary Kreljeta, vendistino, Marija Maurin, oficistino, Eugen Cindrić, ĵurnalisto, Ivo Mrakovčić, oficisto, Zorica Seršić, oficistino, Vinko Antonić, laboristo, Anka Frančić, oficistino, Ljubica Skomina, dommastrino, Dušan Kosić, oficisto, Leopold Pohn, fervojisto, Filip Rožić, fervojisto, Franjo Seršić, tipografo, Ivan Širola, lignajisto, Milivoj Mihajlović, profesoro, Branko Udovičić, oficisto, Blažena Gavrilović, oficistino, Vladimir Džodan, komercisto, Saša Arlić, farmaciisto, Mirjana Uzelac, oficistino, Ante Koprčina, mašinseruristo, Pero Sergović, šoforo, Hamlet Kordić, oficisto, Andjelka Paž, instruistino, Radoslav Škalamera, ĵurnalisto, Nevenka Matijević, dommastrino, Ivan Knez, helpantvendisto, Marica Žanić, oficistino, Maša Pavičić, oficistino, Anka Ivanušec, oficistino, Viktor Muha, kaldronisto kaj Milan Turinski, tipografo.


NOTOJ
(Plenigas la filioj)
Aliĝis al filio Esp. Societo „A. Ŝ. Jarković" Sušak la 16. VII. 1947.
Prezidanto: Skomina  Sekretario:
Aliĝis al filio ........ la ........
Prezidanto: Sekretario:
Aliĝis al filio ........ la ........
Prezidanto: Sekretario:

KROATIA ESPERANTO-LIGO
ZAGREB
★
Membrokarto
N-ro 611
S-an-ino ŠKALAMERA Radoslav
profesio ĵurnalisto
el Sušak
estas regula membr-o
KROATIA ESPERANTO-LIGO
Prezidanto: Sekretario:

Eble ŝajnas al la leganto ĉi tiu teksto tro peza, ĉar la rakonto pri la societa historio ne fluas facile kaj glate, troŝarĝita per multaj nomoj, nombroj kaj aliaj donitaĵojn. Sed, se oni fakte volas pli profunde informiĝi pri la vera stato, tiam estus tre malfacile eviti "tedajn" faktojn.

Do, ankoraŭ kelkajn nombrojn:

En la jaro 1953 estis 75 societanoj,
en la jaro 1955 " lo3 "
" 1957 " lo4 "
" 1962 nur 46 "
" 1976 nur 3o pagis la membrokotizon, kaj sur la listo oni havis 8o membrojn,
" 1977 estis 65 societanoj, sekvontjare 45, kaj tiel pli-malpli ĝis hodiaŭ.... Pasintjare: 4o membroj.

En kvardek jaroj la nombro de loĝantaro en Rijeka kvarobliĝis (de 5o.ooo al 2oo.ooo). Nia societo, laŭ membraro, stagnas. Objektive, ĝi malprogresas, ĉar la ĉirkaŭaĵo ne staras senmova.

Por ke ni ne malkuraĝiĝu, oni devas konstati ke ekzistas ankoraŭ multaj aliaj faktoj kaj faktoroj laŭ kiuj estas observebla sukceso, aŭ malsukceso de Esperanta movado en Rijeka, dum la lastaj kvardek jaroj.

## Helaj punktoj – la grandaj renkontiĝoj

Multajn rekonojn kaj laŭdojn ricevis la societo "A. Š. Turković" en pasintaj jardekoj.Precipe por bonega organizado. de pluraj naciaj kaj internaciaj esperantistaj renkontiĝoj en Rijeka. Elstaras kvin tiaj grandaj renkontiĝoj, kvin lumaj punktoj neforgeseblaj. Tiuj kvin eventoj el la Esperantujo forte ekehis en la publiko de Rijeka, kiel ĉe la reprezentantoj de la urbo kaj ĝiaj socipolitikaj organizaĵoj tiel ankaŭ ĉe komuna loĝantaro.

En Majo 1957. en Rijeka okazis la 9-a internacia fervoj-

ista Esperanto-kongreso. Partoprenis 46o fervojistoj esperantistoj el 14 landoj. La Loka kongresa komitato konsistis el Ĝorĝe Jakšić, Josip Zupanić, Vera Grašić, Pavle Janko, ing. L. Sekereš, Dragutin Sobol, dro Ante Gropuzzo, Selimir Ognjenović, Božo Dvornik, Emil Mihaljević, Jerko Jelicić, Mehmed Jakupović, Franjo Štritof kaj Rado Škalamera.



Loka kongresa komitato de la 9-a Internacia fervojista E-kongreso en Rijeka, 11-17. V 1957.

En la jaro 1959. en Rijeka kaj en Opatija la II kultura festivalo de jugoslaviaj esperantistoj. Partoprenis 65o esperantistoj el kiuj 32o en la programo.

En Julio 1964. okazis en Rijeka la 18-a kongreso de jugoslaviaj esperantistoj. Honora protektanto de la Kongreso estis Ivan Krajačić, tiama prezidanto de Kroatia parlamento. La ĉefreferation pri la loko kaj rolo de esperanto-movado en jugoslavia soċio pre-

pri la loko kaj rolo de esperanto-movado en jugoslavia socio prezentis dro Lavoslav Kraus. Partoprenis 500 personoj. Inter ili gastoj el 11 landoj.

En la jaro 1980. de la 19-a ĝis 25. Julio en Rijeka okazis 53-a internacia kongreso de SAT. Partoprenis pli ol 300 SAT-anoj. La organiza kongresa komitato konsistis el: Meho Jakupović, prezidanto, Zora Žic, sekretariino, Stjepan Đuretić, organiza sekretario, Vjekoslav Moranjkić, vicprezidanto, Emerik Pretnar, kasisto, Zlata Petrović, loĝiga servo kaj ekskursoj, Anja Hurčak, pedagogia fako, Miodrag Simić, kultura programo, Mira Dobrosavljević, komitatanino, Kristina Markov, junularo, Franjo Vokoun, sindikatoj kaj Marinko Gjivoje, informado.






SAT-anoj en 53-a internacia kongreso de SAT en Rijeka, 1980.

En la jaro 1981-a de la 25-a ĝis la 27-a de Septembro en Rijeka, en la hotelamplekso "Uvala Scott" okazis la 13-a trilanda konferenco kun ĉirkaŭ 150 partoprenintoj el Aŭstrio, Italio kaj Jugoslavio. Universitata profesoro dro Josip Vrančić estis prelegînto de la ĉefa konferenca temo: "Totala turismo rilate al realaj eblecoj pri la apliko de Esperanto en turismo, en la regio Alpoj-




-Adriatiko". Laŭ la deklaroj de multaj partoprenintoj, esperantistoj el Aŭstrio, Italio kaj Jugoslavio, la Trilanda en Rijeka estis unu el la plej bone organizitaj trilandaj konferencoj. Multaj membroj de la societo "A. Š. Turković" laboris multe kaj bone en la preparo de tiu ĉi bela internacia manifestacio. Sukceso estis plenplena. "Novi list" publikigis pri tiu Trilanda artikolon ampleksantan la duonon de la jurnalpaĝo.

## Almenaŭ kvar mil kursanoj

Ekde la unua tago de sia ekzisto la unua zorgo de la societo kaj la unua ĝia tasko ĉiam estis kaj restis diskonigi la Internacian Lingvon kaj instrui Esperanton. En kvardek jaroj estis organizitaj multaj kursoj en la societejo kaj en la lernejoj. Oni tute ne troigos, se oni taksas ke dum la lastaj 40 jaroj tra la Esperantaj kursoj en Rijeka pasis almenaŭ kvar mil personoj.

Okazis kursoj diversspecaj: porkomencantaj, elementaj kaj porprogresintaj; gviditaj laŭ la klasika gramatika metodo kaj laŭ rekta, Cseh-metodo; por gelernantoj kaj por instruistoj...

Ekzemple, en la jaro 1951. Meho Jakupović gvidis laŭ la Cseh-metodo Esperantan kurson por 142 lernantoj en la Liceo scientifico. La kurso komencis la 6-an de novembro kaj finiĝis je la fino de Januaro 1952. Ĉiun mardon kaj ĵaŭdon ekde 18-a ĝis 20-a horo. Pro la granda nombro da kursanoj, unu duono vizitadis kurson ekde la 18-a ĝis la 19-a, kaj la dua duono ekde la 19-a ĝis la 20-a horo. Multaj ankoraŭ hodiaŭ memoras la tiaman grandan entuziasmon de la kursanoj, kaj la grandan fervoron de Meho Jakupović. Post la fino de la kurso 60 kursanoj ricevis diplomojn-atestilojn de Cseh-Instituto en Haage, kun la subskribo de ĝia direktoro Andreo Cseh. En la sama jaro Meho Jakupović gvidis alian kurson en la Unua Rijeka gimnazio por 18 kursanoj, kaj en la societejo, (Lisinskoga 4), la kurson por progresintoj, por dek esperantistoj.

Interessa estis la situacio en la jaro 1953, tio estas en la jaro en kiu Universala kongreso okazis en Zagrebo. La publiko en Rijeka tre ekinteresiĝis pri Esperanto kaj la Popola universitato (Narodno sveučilište) intencis malfermi kursojn gviditaj de kompetentaj pedagogoj, profesoroj. Ĝi (la Popola universitato) petis la helpon de la Societo "A. Ŝ. Turković", sed la societo ne povis helpi, ĉar mankis profesiaj instruistoj pri Esperanto.

Ĝis nun oni instruis Esperanton en la kadro de t.n. liberaj aktivecoj en pluraj lernejoj, elementaj kaj mezgrandaj: gimnazio en Sušak, gimnazio en Rijeka, liceo scientifico, en Zamet, en Kastav, en la Hejmo de la industria lernejo, en Zanatska komora, en la Fervojista lernejo, en Kozala, en la lernejoj "Matteotti", "Vladimir Gortan", "Slaviša Vajner-Čiča", "Josip Brusić", "Bratstvo-jedinstvo", en CUO KUOIK, en CUO EUMIK, en la junulara hejmo "Lovorka Kukanić"...

En iuj lernejoj oni instruas Esperanton jam pli ol dudek jaroj, seninterrompe. Oni diras sukcesplene.

Longa estas la vico da kursgvidantoj en tiuj kvardek jaroj. En unuaj postmilitaj jaroj elstaraj kursgvidantoj estis: Skomina, Cila Bahorić, Josip Šikić kaj dr Ante Gropuzzo. Poste Meho Jakupović kaj Anja Hurčak. Sed oni devas mencii ankoraŭ almenaŭ ĉi tiujn nomojn: E. Pretnar, S. Vitolović, Avsec, V. Baletić, Vukelić, M. Šekulja, Kristina Markov, Sanja Bokulić, Branka Blanuša, Rak, Đuretić, Cukrov, V. Morankić, V. Frenelić, Škalamera...

Ĉio ŝajnas bele kaj bone, eĉ tre bone. Sed, kie troviĝas ĉiuj tiuj novebakitaj esperantistoj?

## Esperanto rare aŭdita en la societo

Ĉu la lingvo de esperantistoj estas Esperanto? Ĉu la societanoj parolas Esperanton? Kiam kaj kie? Kie, ekzemple, iu scivolema civitano povas aŭdi Esperantan interparolon en Rijeka?

La demandoj estas tute normalaj, se oni diras ke la lingvo Esperanto estas multoble pli facila ol aliaj lingvoj. Pri tiaj demandoj oni ofte diskutas. Trafoliumante la protokolojn de la Societo "A. Š. Turković" mi trovis ke oni parolis pri tiuj problemoj almenaŭ unu fojon en ĉiu jaro: dum la jarkunveno.

En la arkivo de la Societo la unua Esperante skribita dokumento datumas el la Majo 1946. Ĝis skribis Skomina.Sed,poste, jam la sekvontan jaron Cila Bahorić proponas ke oni skribu la protokolojn Esperante. Ankaŭ la parol-lingvo de la esperantistaj kunvenoj devus esti Esperanto, sed en la jarkunveno la 28-an je Januaro 1948. la prezidanto ekskuzante diras: "Skupština se održava na materinskom jeziku, jer imade medju prisutnim članovima i onih koji ne znaju esperanto".

Iam estis neperceptebla inter esperantistoj krokodili. Ili eluzadis ĉiun okazon por povi paroli Internacian Lingvon. Tial, la 23-an de Februaro 1949. Josip Šikić proponas ke en la societejo oni ĉiam parolu Esperanton. La 26-an de Februaro 1956. Josip Šikić akcentas: "Normale estus ke ni parolu Esperanton en la jarkunveno. La referaĵo kaj la diskuto nur Esperante!" En la jarkunveno la 6-an de Januaro 1963. dr Ante Gropuzzo avertas: "Esperantisto estas tiu kiu parolas Esperante. Malbona esperantisto parolas malbone - kaj tio estas la plej malbona propagando por Esperanto."

Plej akre reagis ankoraŭ unu fojon Josip Šikić, la 13-an de Marto 1966. Li tiam diris: "Estas sensence venadi en la societejon, ĉar oni tie ne parolas Esperanton. Iam estis pli bone. Mi kredas ke oni laboras malbone. Kie troviĝas tiuj novaj esperantistoj?"

Meho Jakupović en la jarkunveno la 11-an de aprilo 1976. riproĉis la krokodiladon kaj entutan foreston de Esperanto.

Ĉe la lasta jarkunveno la demando estis denove levita.

La malnova esperantisto, okdek-jara Ante Rusković, komunisto ekde la jaro 1926. kaj esperantisto, laŭ la konsilo de Partio, ekde la jaro 1929., popolliberiga batalano ekde la jaro 1941. demandis kial oni ne parolas Esperante ĉe jarkunveno. Li estas maljuna, sed kun granda deziro atendis la tagon de la jarkunveno por - antaŭ ĉio - eksenti, ekvivi etoson de esperantista kunveno, do por aŭdi , aŭskulti kaj paroli Esperanton. Li deziras ŝue eluzi tion okazon. Sed vane. Oni respondis al li , ke ekzistas en la societejo konverzaciaj tagoj, dufoje semajne.

Ĉu mi kontentiĝu kun tia respondo?

Elstara esperantisto Nikola Rašić en sia artikolo "Esperanto i esperantisti", publikigita en la lernolibro de la "Zagreba metodo" tute ĝuste skribas:..."esperantistu ne čini samo poznavanje jezika, a čak bi se moglo reći da vladanje jezikom nije uvjet da se netko nazove esperantistom. Biti esperantistom znači prije svega prihvaćati ideje koje pokret za međunarodni jezik ima u svojoj osnovi i zalagati se za njihovo ostvarenje."

Tamen, estas tre grave ĉi tiujn vortojn ĝuste apliki kaj bone konsideri pri la eblaj miskomprenoj kaj nedezirataj konsekvencoj. Se esperantistoj tute ne parolus Esperanton, kiu ĝin parolus? Se neniu parolus, se neniu skribus Esperante - la lingvo mortus,la gazetaro mortus, la Esperanta literaturo mortus. Ĉio malaperus. Se neniu lernus, se neniu legus Esperante - pereus ĉio kion ni fiere nomas monumentoj, kulturo. Akcepti ideojn de la movado batalanta por internacia lingvo signifas tute certe ankaŭ lerni Esperanton, ellerni facilan Esperanton, skribi, legi kaj paroli Esperanton. Se ne estus tiel, kial ni klopodu organizi kursojn?

Do, ne estas facile realigi ĉiujn postulojn kaj celojn de la movado. Tion plej bone sentas gvidantoj de la movado, estraranoj de la esperantistaj organizaĵoj, societoj, kluboj.

# Estraranoj kaj aliaj elstaraj societanoj

Estraranoj de la societo, komitatanoj de la Societo "A.Š. Turković" en la pasintaj kvardek jaroj estis sufiĉe multaj, sed ne tro multaj por ke ni ne havas sufiĉan lokon mencii iliajn nomojn. Sendube, ili ĉiuj meritas tion. Unue dek prezidantoj:Vinko Skomina, Josip Šikić, dr Ante Gropuzzo, Meho Jakupović, Janko Pavle, Anica Hurčak, Vjekoslav Morankić, Stjepan Đuretić, Slobodan Vitolović kaj Sanja Bokulić. Inter ili ĉiuj la plej longan membrecon kaj agadon en la Societo "A.Š. Turković" havas Meho Jakupović (35 jaroj).

Jen dekses sekretarioj en 4o jaroj: Željko Škalamera, Zorica Seršić, Franjo Seršić, Janko Pavle, dr Ante Gropuzzo, Ileana Blažić, Stanko Škrbac, Ante Cukrov, Anica Hurčak, Meho Jakupović, Vjekoslav Morankić, Zlata Petrović, Stjepan Đuretić,Branka Blanuša, Damir Rak, Valter Šverko, Drago Puljko.

Kasistoj estis en 4o jaroj nur kvar: Boška Vučinić, Anka Frančić, Albina Pandur kaj Emerik Pretnar.

Krom tiuj menciitaj nomoj, menciindaj estas ankaŭ kelkaj aliaj elstaraj, malnovaj societanoj, kelkaj veteranoj, kelkaj eĉ forpasintaj: Marijan Levar, Osvaldo Ramous, dr Ante Grgurina, Ivan Cunt, Nediljko Raos, Stjepan Jankač, Ivan Dolinšek, Rudolf Medved, Josip Arrigoni, prof. Milivoj Mihajlović,prof.Mihajlo Hornjak, Mario Kinel, Albert Dessardo, Andja Vurdelja... Mi tre bedaŭras, se mi preterlasis ankoraŭ multajn nomojn de valoraj samideanoj.

Pri ĉiu el ili oni povus aparte rakonti interesajn travivaĵojn el ilia poresperanta vivo kaj agado. Multaj el ili havas tre interesajn personecojn, sendepende de ilia esperantiĝo.

Ekzistas ankaŭ iuj antaŭmilitaj esperantistoj aŭ grandaj amikoj de la movado, kiel ekzemple: Zvane Črnja, Vinko Antić, Maks Petrić, kaj en Pula vivas nia eminenta esperantisto, nia societano dr Ivo Borovečki.

Ĉiuj tiuj homoj lasis ĉu pli profundajn ĉu malpli profundajn postsignojn post sia laboro, utila por Esperanto-movado.

Iuj estis tre aktivaj kaj nun ne plu, ĉar ili estas tro okupitaj per siaj tre gravaj sociaj funkcioj. Ekzemple, Stanko Škrbec multejara, sukcesplena ĉefredaktoro kaj direktoro de la ĵurnalo "Novi list", kaj nun profesia funkciulo de Ligo de komunistoj de Kroatio.

## Malvasta societejo kaj luksa vilao

Ofte oni opinias ke unu el la ĉefaj obstakloj al pli prospera laboro estas nekonvena societejo. Dum kvardek jaroj oni ofte konstatis ke la societejo estas tro malvasta, tro malgranda. La societaj protokoloj abundas pri la zorgoj pri societejo.

En komenco la societo havis neniun ejon. Kaj la kunsidoj kaj la kursoj estis lokitaj en privata loĝejo. Poste oni tenadis kursojn en gimnazio de Sušak, sed nur ĝis la jaro 1949. kaj tiam ankaŭ tiu eblecco forfalis. Kvar jaroj la societo havis unu ĉambron en la strato Lisinski 4 sur la tria etaĝo. Tio estis malgranda ĉambro, en unuaj tagoj tute malplena. Unuopaj membroj de la societo alportadis ĉu tablon, ĉu sidilon... En la jaro 1954. la societo ricevis ejon en la Hejmo de sindikatoj, en la strato Kidričeva 4. Sed la luprezo estis tro granda por la modestaj financaj rimedoj. En la jaro 1961. ni kunvivadis en la mallarĝaj ejoj de la Amatora teatro "Viktor Car Emin" en la strato Račkoga. Tre mizera situacio. Estis spaco sufiĉa nek por konservi la bibliotekon. En la jaro 1966. kunvivado kun la Kultur-arta societo de fervojistoj "Fabijančić" en la strato Kidričeva 9. Poste kaj ĝis hodiaŭ la societejo troviĝas sur la tria etaĝo inter "Muzika junulare" kaj "Alpinista societo" sur la strato Korzo narodne revolucije 2.

En la societejo oni povas kunsidi, sed por pli grandaj kunvenoj oni devas ĉiam denove serĉi pli grandan ejon. Do, problemo restas.



Ĉeestantoj al la jarkunveno de Esperantista societo "A.Š. Turković" en Rijeka 1961.j, kiu okaziĝis en la ejoj, de la Kultur-arta societo "F. Fabijanić".



Geesperantistoj en la societejo kiu troviĝas sur la strato Korzo narodne revolucije 2/III. Antaŭe sidas elstaraj geesperantistoj: Anica Hurčak kaj Emerik Pretnar. Malantaŭe staras gejunuloj, inter ili Sanja Bokulić kaj Vjekoslav Markov. (1978)

Tamen, aliflanke la societo estas "riĉa posedanto", ĉar ĝi estas proprietanto de la vilao "Amfora", bela objekto ne malproksime al maro, en Kostrena, apud Žurkovo. Luksa vileo staras neutiligata. Ekzistas belaj deziroj pri grava Esperanta centro en "Amfora". Ekzistas belaj planoj pri internacia esperantista turisma centro en vilao "Amfora". Sed la planoj malrapide realiĝas.

## Valora biblioteko

Krom la vilaon "Amfora", la Societo "A.Š.Turković" posedas alian valoron: societan bibliotekon kun 500 libroj, inter kiuj troviĝas kelkaj, por ni esperantistoj, tre valoraj kaj tre raraj.

En la komenco la societo ne havis bibliotekon, sed en la plenumkomitate ekde la unua tago oni zorgis pri libroj kaj unu estrarano estis taskigita por libroj. Tiu estis bibliotekisto aŭ bibliotekistino. La unua bibliotekistino estis Maša Gropuzzo, kaj post ŝi tiun funkcion havis Marijan Jurina, Josip Šikić, Marijan Levar, Karmelo Vlahov, Vinko Smokvina, Anton Harbić, Nediljko Raos kaj Karlo Kocijančić. Evidente, oni konsideris tre gravan funkcion de la bibliotekisto. Bedaŭrinde la nuna situacio estas iom ŝanĝita: jam kelkajn jarojn oni ne havas societan bibliotekiston.

Kion faris bibliotekisto kiam la societo ne havis librojn? Laŭ la protokolo el la komenco de la jaro 1948, oni povas ekscii ke ĉe Kroatia Esperanto-ligo estis fondita "vojaĝanta biblioteko". Dum la jaro 1947. la societo "A.Š. Turković" ricevis el Zagrebo 34 librojn, pruntepreninta, tralegitaj kaj resenditaj al KEL. En la jaro 1948. el Zagrebo venis 50 librojn por legado, kaj en la jaro 1949. la "vojaĝanta biblioteko" pruntedonis al esperantistoj en Rijeka kvin fojon po 12 librojn, entute 60 librojn.

Legi Esperantajn librojn – tio estis demando de honoro por la timaj societanoj. La fama esperantista verkisto kaj poeto Karel Piĉ diras ke ne estas bona esperantisto tiu kiu ne tralegas ĉiutage almenaŭ tridek paĝoj el Esperanta libro!

La propra societa biblioteko komencis formiĝi en la jaro 1954. Laŭ la deklaro de tiama bibliotekisto tiujare la societo aĉetis 85 novajn librojn. Post la disiĝo de la Esperanto-klubo en Rafinerija nafte, ĉiuj libroj apartenis al societa biblioteko. En la jaro 1963. la biblioteko havis cent Esperantajn librojn. En la jaro 1976. SIZ za kulturu i obrazovanje en Rijeka donis 3.000 dinarojn por novaj libroj. La biblioteko de tiam disponas per ĉirkaŭ 400 Esperantaj libroj. Poste oni plenigadis la bibliotekon per novaj libroj ne nur aĉetante, sed ricevante kiel donacoj la librojn post-lasintaj postforpaso de kelkaj esperantistoj: Josip Šikić, Marijan Levar, dro Ante Gropuzzo, dro Ante Grgurina, dro Miho Monić...

En la biblioteko troviĝas libroj el la jaroj 19o7, 19o8, 19o9 kaj 191o. Tie estas konservita la originala manuskripto de la 4oo-paĝa Kroata-Esperanta vortaro, neniam publikigita verko de dro Grgurina. Tie troviĝas ankaŭ la originala manuskripto de Slobodan Vitolović: Rječnik termina iz elektroničke obrade podataka engleski--hrvatski-Esperanto, Rijeka, 1o. 7.1972, paĝoj 49.

En la lastaj monatoj la biblioteko denove pliriĉiĝis per kelkaj dekoj da novaĉetitaj libroj. Nepre oni elektu konsciencan komitatanon por la funkcio de bibliotekisto. La libro estas multe-kosta, sed ankaŭ tre valora havaĵo.

Tute senordaj estas ekzempleroj kaj kolektoj de Esperantaj bultenoj, gazetoj kaj revuoj. Bedaŭrinde. La estonta bibliotekisto devus tion ordigi kaj zorgi pri novaj publikaĵojn.

## Kongresoj, renkontiĝoj, ekskursoj, vojaĝoj

Esperantistoj estas vojaĝemaj. Preskaŭ ĉiu esperantisto sonĝas pri kongresoj, pri novaj rekontiĝoj, pri vojaĝoj kaj ekskursoj. Ne nur kiel ĉiu komuna turisto, sed iom aliel. La veran Esperantujon oni povas travivi nur ĉe internaciaj renkontiĝoj kaj precipe ĉe universalaj kongresoj.

Kelkaj esperantistoj el Rijeka multe vojaĝis kaj vizitadis multajn internaciajn kunvenojn. Plej multe vojaĝis verŝajne Jakupović, kun sia familio. Li konas persone preskaŭ ĉiujn vivajn gravajn personecojn en la Esperanto mondo. Ekzemple, li estis unu el komitatoj de Trilanda konferenco. Ĝis nun li partoprenis al ĉiuj Trilandaj konferencoj en Jugoslavio, Aŭstrio kaj Italio (18).

Preskaŭ al ĉiu Universala kongreso aliĝas iu esperantisto el Rijeka, sed la unua pli granda, pli amasa vizito al iu kongreso okazis en la jaro 1953, kiam la UK estis en Zagrebo. Al tiu kongreso partoprenis el Rijeka 28 esperantistoj.



Esperantistoj en Rijeka en la jaro 1953. dum la vizito de Mason Stuttard la tiama KKE-o veninta el Londono al Jugoslavio organizi la Universalan kongreson.

Al UK en Mainz, en la jaro 1958. el Rijeka partoprenis 25 societanoj. Meniam antaŭ tiu jaro tiel impona numero da Rijekanoj partoprenis iun UK eksterlande!

Ĉi-jare la UK estos tre, tre malproksime - en Pekino.Tamen, du societanoj el Rijeka verŝajne partoprenos tiun grandegan manifestaĵon.

Ĉarmaj estas ankaŭ la pli proksimaj vizitoj. Kaj tiuj estas plej oftaj. Dum 40 jaroj esperantistoj el Rijeka ekskursis, vojaĝis al: Varaždin, al Ljubljana, al Crikvenica, al Selce (hotelo "Esperanto") al Postojna, al Zagreb, al Rovinj, al Harlem (Nederlando), al Bologno, al Marseille, al Lošinj kaj Cres, al Punat, al Vieno, al Graz, al Celovec, al Udine, al Triesto, al Venecio, al Gorico, al Skotlando, al Islando, al Bulgario, al Greklando, al Budapeŝto al Novi Sad, al Finlando, al Fužine, al Primošten, al Sarajevo, al Osijek, al Kutina, al Sisak, al Kumrovec, al Đurđevac, ktp, ktp.



Vizito de esperantistoj el Rijeka al Mali Lošinj

## Eminentaj gastoj

En kvardek jaroj la societo kaj la societanoj konatiĝis kun multaj eksterlandaj esperantistoj. La societo kaj la unuopaj iliaj membroj estis ofte gastigantoj ĉu de unuopaj esperantistoj ĉu de esperantistaj grupoj el eksterlando.

En la jaro 1951, en aŭgusto venis al Rijeka 34 norvegaj esperantistoj, kiel turistoj.

Tiaj grupoj poste venadis ofte, precipe post kiam Primošten iĝis internacia esperantista somerumejo.

Inter ili ni menciu unuopulojn, eminentajn personecojn de la tutmonda movado. Unu el tiuj estis Mason Stuttard, konstanta kongresa sekretario (KKS). Li alvenis al Rijeka en Majo 1953. La 13-an de Majo li havis publikan prelegon en Kulturdomo "Vid Švalba" antaŭ 200

aŭskultantoj pri la ideo de internacia lingvo, pri la disvastigado de Esperanto en la mondo kaj pri la rilatoj Unesko - Esperanto. Mason Stuttard prelegis ankaŭ en Opatija kaj en la societejo A.Š. Turković". Por "Riječki list" li donis intervjuon, amplekse publikigitan poste en tiu ĵurnalo.

En tiu jaro venis al Rijeka, post la UK en Zagrebo, Teo Jung, la plej fama profesia Esperanto-ĵurnalisto kaj fondinto kaj ĉefa redaktoro de "Heroldo de Esperanto". Ankaŭ li donis intervjuon al "Riječki list".

La sekvontan jaron venis dro L. Wegener, aŭtoro de la Esperanta libro "Arto fariĝi centjara". Li venis el Essen (Germanujo) kaj li havis en Rijeka publikan prelegon pri la enhavo de lia libro.

La societejon vizitis ankaŭ eminenta esperantisto el Japanio Niŝi Jasuhiro el Kawasaki, ĝemeliĝa urbo kun Rijeka. Niŝi Jasuhiro donacis al nia societa biblioteko donacon, la libron "Neĝa lando" de Kawabata. Tio estis la 21-an de Julio 1976.

Post la UK en Budapeŝto, al Rijeka venis kompleta ĉina delegataro, gvidata de la ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-ligo Ĝang Ĉjiĉeng. Ĝi donacis al nia societo belegan sursilkan bildon de dro Zamenhof.

El Ĉinio venis al ni ankaŭ ĵurnalistino de Esperanto-fako de Radio Pekino sinjorino Li Yuping. Li donis intervjuon al "Novi list" kaj al la Radiostacio Rijeka. Tio okazis fine de Marto 1985.

La geedzoj Goodheir estis en la rondo de esperantistoj en Rijeka la 19-an, 2o-an kaj 21-an de Majo 1985. Profesoro Albert Goodheir estas aŭtoro de dek Esperantaj librój. Lia edzino Phyllis estas ankaŭ fervora esperantistino.

Inter tiuj eminentuloj aldonu ni ankaŭ nian Tibor Sekelj, kiu tre interese prelegis en Rijeka jam en la jaro 1954.

## Okazintaĵoj, aranĝoj, ideoj...

Tra la kvardek jaroj la societo travivadis multajn belajn tagojn, sed ankaŭ malbelajn. Konstante oni travivas tajdon: jen al-

fluso, jen defluso. La tuta vasta socio ŝanĝiĝas, la ĉiutagaj aspektoj de la vivo senĉese, senhalte alportas ion novan, ion diversan, novajn okazintaĵojn kaj novajn ideojn,novajn dezirojn kaj novajn postulojn. Ankaŭ la homoj ŝanĝiĝas; la modo, la kondutmanieroj...

Ankaŭ en nia societo devas ĉiam io okazadi. Se nenio okazus, neniu venus al ni. Se la societa vivo estas monotona, eĉ malplena, la juna mondo ne interesiĝos pri ni.

Do,ĉu estis sufiĉaj okazintaĵoj,aranĝoj,ideoj,deziroj, planoj kaj programoj en nia societo dum pasintaj 4o jaroj? Ĉu oni trovadis ĉiam freŝajn, agemajn, kapablajn, spiritajn kaj sagacajn fortojn? Aŭ, ĉu ni jam laciĝiS konstante semante? Antaŭ ol fari pezajn konkludojn, ni trarigardu, rapide trakurante tra pasintaj 4o jaroj, kelkajn ĝis nun ne menciitajn faktojn:

- En la societejo en Lisinskoga 4/III la 27-an de Majo 1951. okazis leterVespero. Inter aliaj, partoprenis Jože Koželvčar (fama nomo en jugoslavia E-movado), Tone Logar, Edvino Veggian, Franz Gruber, kaj inter samideanoj el Rijeka la unuan fojon aperas la nomo de Meho Jakupović...

- En la mondofenestro de Riječki magazin, Korzo, ekde 25-a Oktobro ĝis la 7-a Novembro 1951. ekspozicio de E-libroj, gazetoj, bildkartoj... Autoroj: Meho Jakupović kaj Franjo Seršić.

- La 3o-an de Oktobro 1951 prelego pri Esperanto en itala kultura klubo Circolo...

- En la 15-a kongreso de jugoslaviaj esperantistoj en Ljubljana dekdu membroj el Rijeka.

- Vinko Skomina la 2-an de Septembro 1952 prelegis pri la temo "En itala koncentrejo". Li estis arestita far faŝistoj en Sušak la 29-an de Junio 1941. El koncentrejo li eliris la lo-an de Jan. 1944.

- En Majo 1952 starigita konstanta ekspono de esperantaĵoj en kiosko sur la placo Gortan.

– En la jaro 1953 organizita E-ekspozicio en Rovinj.

– La 8-an de Julio 1953, aŭtobuse el Danlando venis al Rijeka 35 esperantistoj. Unu inter ili estis Ole Schröder. Kun li tiam konatiĝis la sekretariino de la Societo, Ileana Blažić. La rezulto: post nelonge ili iĝis geedzoj. Ileana forveturis al Danlando.

– En Oktobro 1953 inter societanoj libervola kolektado da libroj por fondi societan bibliotekon. Rezulto: kolektitaj 12 libroj...

– En aŭtuno 1954. en Narodna čitaonica, en Korzo, ekspozicio de E-libroj kaj gazetoj.

– Stanko Škrbec la 26-an de Februaro 1956. proponis ke Narodna čitaonica en Korzo, inter aliaj gazetoj, regule havu ankaŭ Esperantajn. Propono akceptita, sed neniam realigita.

– En la jaro 1955 dro Ante Gropuzzo dufoje publike prelegis pri Esperanto: en Rafinerija nafte kaj en Zanatska komora.

– En la jaro 1955 en societejo serio da prelegoj. Inter aliaj: pri UK en Bologno (Gropuzzo), pri la vojaĝo en Grekio kaj Turkio (Jakapović), pri la historio de E-movado en Rijeka (Šikić).

– En la jaro 1955 la societejon vizitis 17-membra grupo de esperantistoj el Svislando.

– En 1956. vizitoj el Francio, Norvegio kaj Novzelando. Prelego pri Norvegio, prelego pri Novzelando.

– En la jaro 1958 vizito de 10-membra grupo el Pollando.

– La 27-an de Marto 1966 la societa plenumkomitato, kun la prezidanto Vjekoslav Morankić, decidis organizi Loterion por akiri monon por E-agado.

– La 16-an de Oktobro 1963. Anjo Hurčak havis publikan prelegon en Narodno sveučilište "Kontribuo de Esperanto al internacia interkomprenado kaj al realigo de Unesko-celoj".

- En somero 1963. starigita Turisma servo esperantista en fervojstacio Rijeka. Ĉiun tagon deĵoris po unu membro de la Societo "A.Š. Turković". Estis starigita ankaŭ bona kunlaboro kun "Kvarner-express". Alvenadis esperantistoj-turistoj,direktitaj al Primošten, el Germanio, Svedio, Danlando, Aŭstrio kaj Francio.

- En la jaro 1964. en la societejo naŭ prelegoj. Prelegintoj Meho, Anja, Pretnar, Drago Crnić, prof. Mihajlović, dro Gropuzzo. Ili prelegis pri Primošten (esperantista internacia somerumejo), pri Freinet movado, pri la strukturo de la E-movado...

- En la jaro 1964, dum la Kongreso de jugoslaviaj esperantistoj en Rijeka, tri membroj de la societo ricevis jubilean diplomon por la pli ol 2o-jara poresperanta agado, 2 membroj E-ordenon por meritoj kaj 5 membroj laŭddiplomojn.

- Pavle Janko la 31-an de Januaro 1954. avertas: "La ĉefa nia manko estas - malforta kunligo kun amasaj sociaj organizaĵoj".

- Vjekoslav Moranić la 13-an de Marto 1966. admonas: "Esperantistoj en Rijeka ĝis nun ne sukcesis pli esence enkondukiĝi en la socian vivon de la urbo. Nepras publike prelegi,aktive agi en aliaj societoj kaj asocioj."

- Meho Jakupović (13.3.66.) konstatas: "Malgranda intereso por la kunvenoj estas rezulto de senenhavaj renkontoj".

- Ante Rusković (13.3.66.) observas: "Ni vivas kiel iu sekreta, konspirativa societo. Antaŭ la milito la esperantistoj estis aktivaj en diversaj organizaĵoj."

- Esprimo de malkontento en jarkunveno la 15-an de Marto 1969: Jam dek jaroj la societo ricevis neniun subvencion.

- En la jaro 1972 komencis korespondа kunlaboro inter esperantistoj de Rijeka kaj Jalta. Interŝanĝo de revuoj. Rijeka kaj Jalta estas du ĝemeliĝitaj urboj. Poste la kunlaboro ĉesis.

- La 12-an de Decembro 1972 en la kadro de "Tribina 2o"

de Radničko sveučilište en Rijeka Anjo Hurčak prelegis pri E. Rezulto: E-kurso kun 5o kursanoj.

- La 15-an de Majo 1953 Renato Bisi, elstara triesta esperantisto, skribis al Slobodan Vitolović: "Gesamideanoj el Triesto certe partoprenos al renkonto en Motovun..."

- La 12-an de Maje 1974, ĉe Maribora konferenco, Anjo Hurčak elektita kiel direktoro de la Internacia esperantista tendarlernejo en Primošten.



Anja Hurčak kiel instruistino de la A-B kurso
kun siaj gelernantoj en Primošteno, 1975

- En la jaro 1977 kvin esperantistoj el Rijeka konatiĝis en Stirling (Skotlando) kun William Auld, Robert Goodheir kaj Marjory Boulton, tri famaj E-verkistoj.

- En Oktobro 1977 grupo da societanoj vizitis en Grižane malnovan samideanon Stjepan Crnić.

- La 15-a de Aprilo 1978 - grava dato. En Zagrebo kunfandiĝis KEL (Kroatia Esperanto-ligo) kaj KEJA (Kroatia esperantista junulara asocio) sub la nomo KEL (Savez za esperanto Hrvatske). Tio signifas la komencon de la organizado laŭ delegita sistemo, laŭ nova statuto.

- En la jaro 1978 oni akcentis ke en la Elementa lernejo "Matteotti" en Rijeka Esperanto estas instruata, en la kadro de t.n. libervolaj aktivecoj, jam 15 jaroj.

- Dum la SAT-kongreso en Rijeka, en la jaro 1980, konatiĝis membro de nia societo Vjekoslav Markov kun juna francino Anne-Sophie Lévy. Poste ili geedziĝis. Nun ili vivas en Chevrense apud Parizo.

- Al Pedagogia seminario en Primošten partoprenis el Rijeka kvin membroj de la societo, en la jaro 1978.

- Dum Januaro kaj Februaro 1981. en ĵurnalo "Novi list" du serioj da artikoloj pri E: "Prokletstvo babilonske kule" kaj "Radnički jezik". Aŭtoroj: Gjivoje kaj dro Borovečki.

Ĉi tiu kalejdoskopa "kalendaro" ne ampleksas la lastajn kvin jaroj. Unue, la okazintaĵoj estas tre vivaj kaj freŝaj en la memoro, kaj, due, pri la novaj agoj kaj planoj sekvos la vortoj en la fina parto de ĉi tiu, diru ni, historia trarigardo.

Oni povus ĉi tie nur substreki ke oni ofte abundis je belaj deziroj, diversspecaj ideoj kaj planoj, sed avaris forta volo kaj adekvata kapablo kaj kompetenteco, sendepende kia estis la rilato de la socio al la financaj rimedoj kaj bezonoj de la societo. Interalie, grava estas ankaŭ la ĝenerala intelekta nivelo de la societa estraro - por la kontaktoj en la vastaj publikaj rondoj, kaj por la reputacio en la vasta socia vivo.

## Perspektivoj

Ĉiun jaron almenaŭ unufoje estas la okazo analizi la situacion, la staton de nia afero en ĝia tuta amplekso. La jarkunveno estas tiu okazo por kritike, serioze konstati bonon kaj malbonon, por malfermi pli sukcesplenajn perspektivojn.

Inter ĉiuj konservitaj protokoloj pri jarkunvenoj dum 4o jaroj de la E-societo "A.Š. Turković", unu ŝajnas al mi la plej

profunda kaj la plej enhavoriĉa. Tiu estas la protokolo el la jarkunveno okazita la 31-an de Januaro 1954. La plej grava parto de tiu protokolo estas la raporto de la sekretario dro Ante Gropuzzo pri la laboro en la jaro 1953, en tiu fama jaro de la UK en Zagrebo.

Mi citos el tiu raporto kelkajn akraja frazojn:

- Centro kia estas Rijeka reprezentas sendube tian regionon kie oni devis pli forte interesigi la civitanojn por Esperanto movado kaj almenaŭ dekabligi niajn vicojn.

- Kiam mi donas ĉi tiun sufiĉe negativan prijuĝon pri nia laboro en la pasinta jaro, mi havas antaŭ miaj okuloj precipe la cirkostancon ke la vizito de la konstanta kongresa sekretario sinjoro Mason Stuttard kaj de li farita kultura-propaganda agado donis al ni favorajn moralajn kondiĉojn por la pli ampleksa laboro. Krome, ankaŭ la Popola universitato en Rijeka, pere de ĝia direktoro prof. Antić, larĝe malfermis ĝian pordon kaj montriĝis pretecon ĉiudirekte helpi nian laboron propagi Esperanton.

- Ĉu ni havas senkulpigon por tio? Senkulpigon oni povas trovi nur en la cirkostanco ke ĉi tie en Rijeka mankas al ni unu sufiĉe forta kerno da kapablaj, oferemaj kaj fervoraj esperantistoj, kiuj povus organize pli grandskale gvidi Esperanto-movadon. Ĝis nun ni ne sukcesis krei tian kernon. Laŭ mia opinio, necesas en la movadon altiri grandetan grupon da personoj povontaj, post la konkero de la lingvoscio, ili mem kapabliĝi por la kursgvidantoj, kaj povantaj ili mem profunde konatiĝi la esencon kaj la historion de la Esperanto-movado, por ke ili povu memstare ĉio aperi kiel prelegantoj.

En tiu tempo kiam dro Gropuzzo skribis la cititajn vortojn, de antaŭ 32 jaroj, la societo havis 70 membrojn. Dro Gropuzzo ne estis kontenta pro tia stato, li volis ke la societo havu almenaŭ 700 membrojn! Kion ni diru hodiaŭ. En la lastaj tridek jaroj ne nur multobliĝis la loĝantaro de Rijeka, sed ankaŭ en aliaj direktoj la

urbo progresis. Ekzemple, hodiaŭ ekzistas en Rijeka universitato kun pluraj miloj da studentoj, kaj inter ili sendube troviĝas multaj honestaj, talentaj, scivolemaj gejunuloj.

Dro Gropuzzo pravis postulinte kreon de forta kerno da kapablaj kaj sindonemaj esperantistoj.En tio vidas la perspektivon ankaŭ la nuna estraro de la societo. La ĉefa agado en du-tri lastaj jaroj direktiĝas ĝuste al tiu celo: krei fortan kapablan kernon. El tio konsistas ankaŭ la ĉefa parto de societaj planoj kaj programoj.

La novaj, freŝaj, junaj fortoj eluzu kaj ekspluatu, almenaŭ kiel instigantaj ideoj, ĉion kio estis bona dum kvardekjara societa agado kaj penado. Akomodiĝu malnovajn ideojn al la novaj cirkostancoj, sed antaŭ ĉio - kreu la kapablan kernon.

Esperanto konsistas el tri nedividigeblaj elementoj: lingvo, movado kaj specifa kulturo-literaturo. Por bone naĝi en la maro de ĉiuj el tiuj tri vastaj spacoj, la forta kerno devas konsisti el solide edukita membraro, kapabla pri saĝe kaj prudente diskuti sur inda nivelo, kompetente eniranto kaj penetrante publike en ĉiujn sociajn tavolojn, en la sferon de edukado kaj instruado, en la sferon de kulturo, en la sferon de soci-politikaj rondoj. Tiu kerno estu antaŭkondiĉo por plua laboro por amasigo de la movado.

## Interligo kun KEL kaj JEL

Verŝajne ne decus senvorte preterpasi la rilatojn inter la "bazo" kaj "supraj" instancoj, inter la societo kaj la respublika Ligo, kaj ankaŭ inter la societo kaj JEL.

Ne multe oni povas diri, ĉar ekzistas diversaj opinioj kaj variaj, diskuteblaj starpunktoj pri la interrilatoj inter esperantistoj en nia lando. Ĝenerale oni sentas iun malkontenton pri la stato.

Oni povas emfazi multajn benegajn ecojn karakterizantaj Zagrebon kiel elstara, mondskale elstara Esperanta centro,sed tamen, kion havas, kiun utilon havas de tio, ekzemple Rijeka? Utilo estas,

sed ne sufiĉa. Tro malmulta kunlaboro. Ekzemple,ĉu la Trilanda konferenco estu pravigeble neglektata flanke de KEL? Kaj kiaj estas la du lastaj jarkunvenoj de KEL - sen Esperanta vorto?Kaj tiuj rilatoj [illegible]AS, kie neniam praktike klaras kiu al kiu servas, kaj pro kio. Eble oni povus konkludi ke la respondecon ni dividas ĉiuj, ĉar pri ĉio demokrate decidas delegitaro. Bone, sed ĉu ni estu kontentaj, se ni ne havas iun revuon similan al iama "La Suda Stelo"? Entute, kio interligas nin ĉiujn esperantistoj en Jugoslavio?

## Sojle de la granda jubileo




La sekvonta jaro gravas por la tuta Esperantujo.Ni troviĝas sojle de la granda jubileo, la Centjara Jubileo. Por la societo en Rijeka la sekvonta jaro estos ankaŭ la jaro de unu alia jubileo,8o-a datreveno de la fondiĝo de unua Esperanta organizo en Rijeka. La societo sin preparas por digne signi tiun daton.

Bonan parton de tiu tasko povus prendi sur sin "Heliko", la gazeto modeste naskita antaŭ kvin jaroj en la rondo de junaj entuziasmaj esperantistoj en Rijeka. Dank' al ekzisto de tiu gazeto, kvankam ĝi aperas tre neregule, realigeblas publiko de ĉi tiu modesta promeno tra la vojoj kaj senvojoj de la 4o-jara vivo de nia "AŜT".

# Esperanto en gazetoj

Dum 40 jaroj rijekaaj, lokaj gazetoj raportis pri esperanto-okazaĵojn en nia regio. Jen kelkajn titolojn:

**ESPERANTISTI JUGOSLAVIJE DALI ČETRDESET NARODNIH HEROJA**

**RADNIČKI JEZIK**

**DUBOKI HUMANIZAM**

**NAPREDNA KNJIŽEVNOST NA ESPERANTU IZMEĐU DVA RATA**

**Seminari za nastavnike esperanta**

● Temelj za osnivanje pedagoške sekcije pri Esperantskom društvu »A. Š. Turković« i daljnje širenje esperanta, posebno u školama

RIJEKA, 16. srpnja Seminari za nastav- ... rović i Sanja Vukmirović. Pohvaljene su Arijana Jovanović, Sanja Vukmirović, Del-

**Esperanto u riječkoj Osnovnoj školi »Moša Albahari«**

**Jezik mira i suradnje**

U riječkoj osnovnoj školi »Moša Albahari« na Pod-

**U SPOMEN AUTORU ESPERANTA**

**Zamenhofov dan**



Dr LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF, tvorac međunarodnog jezika

Riječki esperantisti su ... vline obilježili Za... dan (15. pro... načina. ... ...vore »Mladosti« na Korzu ... večeri u društvu ... dra Lazara

**TITO: ESPERANTO U ŠKOLE**

»...Esperanto se mora uvesti u škole, ali ne nekim dekretom odozgo, nego svjesnim zahtjevom javnog mišljenja, dakle odozdo, na [illegible] demokratski način.«

**Zamisao o općejugoslavenskom časopisu na esperantu**

RIJEKA, 14. ožujka — Skupština riječkih esperan-

**Prvi diplomirani nastavnici esperanta**

● Među 13 diplomiranih na Pedagoškoj akademiji Univerze »Edvard Kardelj« u Ljubljani je i Riječanin Damir Rak

RIJEKA, 1. prosinca — Po... Također, esperanto mnogo-

**PROKLETSTVO BABILONSKE KULE**

# INDUSTROOPREMA

TELEFON: 421-344, 421-191, 423-242

RADNA ORGANIZACIJA ZA PROIZVODNJU SPECIJALNIH INDUSTRIJSKIH STROJEVA, UREĐAJA I LIJEVANIH PROIZVODA, n. sol. o. OOUR-a

RIJEKA, Braće Šupak 19

PROIZVODNI PROGRAM:

1. OPREMA ZA UNUTARNJI TRANSPORT
   - jednotračne i dvotračne mosne dizalice
   - stupne i konzolne dizalice
   - dizalične staze

2. OPREMA ZA BRODOGRADNJU I PETROKEMIJSKU INDUSTRIJU
   - izmjenjivači topline svih vrsta i namjena

3. OPREMA ZA UŠTEDU ENERGIJE "EKONOKOND"
   - otparivači, spremnici kondenzata, hidraulički ublaživači, parakondi

4. OPREMA ZA ZAŠTITU OD POŽARA "VATROSTOP"
   - tlačni dozatori, zračne komore i visokotlačni industrijski dozatori

5. LJEVANJE SVIH VRSTA ODLIJEVAKA IZ SL

TELEFON: CENTRALA (051)421-344, 421-932, 424-168 * DIREKTOR: (051)421-191 * PRODAJA: (051)423-242 * NABAVA: (051) 423-946
OOUR OPREMA: (051)424-968 * OOUR LJEVAONICA: (051)23-239 * TELEX: 24454 YU IOP RI * TELEGRAM: INDOP RIJEKA * POŠT. PRETINAC: 204


E
RIJEKA